Pilo-Press
Jara abono
30,- GM

# PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 2/78 - 13 jan 1978
Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69
Pĉk Nürnberg
819 56-851

## Denove pri la Eŭropaj Elektoj

Nürnberg (pp) - En END (Pilo-Press germana) N-ro 24/77 ni skribis pri la eŭropa kongreso de Europa-Union, la 3-an kaj 4-an de decembro 1977 en Bonn, kaj pri la sinteno de la esperantistoj. Intertempe ni publikigis la cirkuleron de d-ro P. Denoel pri Eŭropa Esperanto Unio kaj ties estontaj agadoj (Pilo-Press n-ro 49/77).

Sub la dato de la 8-a de januaro 1978 skribis al ni pri tiu temo ankaŭ la prezidanto de Germana Esperanto-Asocio. Ŝi skribis i.a.:

Ankaŭ mi aŭdis pri la menciita kongreso de Europa-Unio en Bonn kaj legis pri la esprimoj de kelkaj politikistoj. Jes, ja ili certe ankoraŭ ne komprenas, ke ni esperantistoj ja havas jam dum 90 jaroj bonan ilon por interkompreniĝi kun aliaj homoj.

Ĉie en la federacia respubliko estis fonditaj antaŭ nur kelkaj tagoj komisionoj, kiuj laboras por la eŭropaj elektoj. En tiuj rondoj troviĝas personoj, kiuj venas el la vicoj de la politiko, kulturo, sindikatoj, eklezioj, konsulejoj, soldatoj, amasmedioj, sportistoj, k.s. Mi ŝatas informi vin, ke en la bavara komisiono troviĝas amiko Hermann Schmid kaj en la hamburga - ĉar mi estas prezidanto, tiu validas por la tutgermana - estas mi membro. Do, vi povas per tiu informo konstati, ke esperantistoj jam kunaktivas.

Mi ankaŭ alskribis jam antaŭ kelkaj semajnoj spertajn esperantistojn, en la diversaj unuopaj landoj en nia respubliko, ke ili ankaŭ atingu la rondojn, nome la landajn komisionojn. Laŭ mi en ĉiu landa komisiono troviĝu esperantisto. Sed bedaŭrinde ĝis nun mi ne havas respondojn....

Do, mi esperas, ke per tiuj informoj vi estas iomete pli trankvila, ĉar eble vi opinias, ke ni dormas kaj pretervidas la temon, sed tute ne. Estas mia persona impreso, ke ni ĉiam trovas ankoraŭ pli multe, ekster de niaj rondoj, pli da rekono favore al nia nacia kaj internacia laboro por Esperanto.

*****************

## Komuna protokolo de SAT kaj ILEI

Parizo (pp) - La P.K. de SAT komunikas: "En Parizo ĉe Liceo Carnot, kunsidis la 5-an de novembro 1977, je la 15 h. la estraro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) (Sonnabend - Dazzini - Turin - Olsson) kaj Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) (Lévy - Chevrolat - Dreschmann-Lebec) por esplori la eblecojn de kunlaborado.

Post konstato de memstareco kaj sendependeco de ambaŭ organizoj, ili interkonsentis komenci la kunlaboron pri jenaj punktoj:

A-1 Disponigi lokon en la oficialaj presorganoj por informoj kaj artikoloj.
A-2 Interŝanĝo de protokoloj kaj dokumentoj;
A-3 Okazigi laŭnecese komunan estrarkunsidon;

SAT kaj ILEI decidas starigi unuopajn komisionojn cele al la subaj punktoj:

B-1 Organizado de mondekspozicio de infandesegnaĵoj en la kadro de la internacia jaro de la infano de Unesko.
B-2 Partoprenado en la planita simpozio en la jaro 1979a pri ĝeneralaj kaj specifaj lingvaj problemoj;

Komuna protokolo....(Daŭrigo)

B-3 Helpado en la teknika organizado de internaca lernejo en la jaro 1979a

B-4 Proponi kunlaboradon al la aliaj esperantistaj kaj neesperantistaj organizoj por la samaj komunaj celoj.

*******************

Vizito al Esperanto-Centro en Luksemburgo

Nürnberg (pp) - D-ro J. Kondor, Neuwied, kiu jam kelkfoje ĉi tie raportis pri Esperanto-okazaĵoj, vizitis la 4-an kaj 5-an de januaro ĉijare la novfonditan Esperanto-Centron en Luksemburgo. En kelkaj daŭrigoj ni publikigas ĉisekve la raporton de d-ro Kondor:

Merkrede matene, ĉ. la 8,20 h mi ekveturas kaj post agrabla veturado mi alvenas ĉ. la 11 h en Luksemburgo. Traveturinte la Ruĝan Ponton mi devis nur kelkajn centmetrojn veturi en la urbo kaj jam atingis la Centron, sur trafikplena placo, en la Rue des Bains 1 A. Mi ĵus elpaŝis el la aŭtomobilo, kiam jam mansignis el la proksimo s-ino Verena Gass, kiu ĵus venis el aĉet-promenado. Ŝi gvidis min supren en la Oficejon, kiu troviĝas en la unua etaĝo, en malnova domo kaj konsistas el du ĉambroj, elegante, moderne, komforte meblitaj. Unu el ili estas por la Ĉefo (Triksini), unu por la Sekretariino, s-ino Verena Gass. Malgranda apuda ĉambro servas por magazeno, kie s-ro Triksini kolektas kaj gardas ĉiujn Esperantaĵojn vendeblajn kaj donaceblajn.

Baldaŭ - post telefonado - venis s-ro P.Hj. Kindler (Triksini) kaj ĝoje kaj reciproke salutinte unu la alian mi povis detalajn informojn ricevi de li persone pri la Oficejo kaj pri lia agado entute. Mi ekscois, ke la Oficejo malfermiĝis solene dum la Zamenhof-vespero, la 16.12.77. De tiu tempo preskaŭ konstante sonoras la telefono, multaj homoj volas ricevi informojn, konsilojn rilate Esperanton kaj Triksini estas preta tuj doni ilin en diversaj lingvoj (franca, angla, itala ktp.).

Lia agado estas duflanka, parte por la Eklezio, parte por Eŭropo. Konvene al tiuj ĉi direktoj liaj leterpaperoj havas du vizaĝojn. Tiuj, kiuj estos forsendataj al politikaj instancoj, neŭtralaj organizaĵoj, ricevas leterpaperon kun la Verda Stelo, enmeze kun la litero E kaj nature la plenan adreson de la Oficejo. La aliaj leteroj, kiujn Triksini sendas al ekleziaj instancoj kaj organizaĵoj, havas la Verdan Stelon kun kruco en la mezo kaj nature la plenan adreson.

Daŭrigo sekvos!

Speciala numero pri arkeologio

La metodoj uzataj en diversaj landoj de organizitaj ŝtelistoj por forrabi kulturajn trezorojn kaj arkeologiajn restaĵojn, la vojoj utiligataj de internacia reto de senskrupulaj aventuristoj por kaŝeksporti kaj komercigi tiujn valorajn antikvaĵojn -- estas detale priskribitaj de Bernard Golden, arkeologo ĉe la Muzeo Bakony en Veszprem (Hungarujo), en artikolo aperinta en la Scienca Suplemento de "Heroldo de Esperanto" n-ro 16/77 (1623). Bildoj kaj grafikaĵoj kompletigas la artikolon.

Alia parto de la Suplemento science pritraktas la problemon de la neidentigitaj flugantaj objektoj. Pluraj bildaj dokumentoj ilustras la analizon de la aŭtoro, Alberto Fernàndes (Belgio).

Heroldo de Esperanto kostas jare 26,50 GM. Oni pagu la sumon al Heroldo de Esperanto, 13, Rue de Reinette-Pippelingstr., Box 28, Bruselo 1.

Pri Pilo-Press kaj E-gazeto

Mi kredis, ke Esperanto estas pli mortanta ol vivanta. Via Pilo-Press denove restarigis min kaj fortigis mian kredon je Esperanto. Oni vidas ke necesas ankaŭ por Esperanto-amiko regule legi gazeton kiu ĉiam kaj ĉiam lin kuraĝigas.

El letero de Richard Rieder, Traunstein

## Retrorigardo je la ĵus pasinta jaro

## Teksto de Carandina, traduko de Antonio de Salvo

Estas kutimo, komence de nova jaro, fari bilancon pri tiu forpasinta, reliefigi kuriozaĵojn kaj informojn de malpeza kroniko, kaj legi en la steloj la estontecon.

Ĉi-jare, kontraŭe, ankaŭ la popularaj gazetoj, kiam ili faras resumon de 1977, dediĉas nur kelkajn liniojn, preskaŭ preteratente, al la fianĉiniĝo de Karolino el Monako, al la 25-jara datreveno de la reĝineco de Elizabeta, al la naskiĝo de la princ-heredanto de Svedujo.

La kaŭzo de tio kuŝas, bedaŭrinde, en la maltrankvilo kaj en la timo, kiu regas preskaŭ ĉie. Ŝajnas, ke la tutmondaj ĵurnaloj iĝis egalaj, kun la samaj informoj kaj la samaj demandoj: "Kiel bremsi la plialtiĝon de la prezoj? Ĉu oni sukcesos forigi senokupitecon? Ĉu oni evitos krizon? Kiel kontraŭbatali terorismon? Kial tiom da absurda perforto?"

Dume,oni batalas inter Somalio kaj Etiopio, daŭras la interna milito en Irlando, gerilo estas en Rodezio, Zairio kaj Kamboĝo. Nur en Mezoriento ŝajne aperas nova espero, kaj tiuj, kiuj ĝis antaŭ nelonge serĉadis la "Homon de la jaro", lin trovis en la malplej antaŭvidebla: en Sadat, kiu estis taksita naiva kaj kuraĝa, sed ankaŭ saĝa kaj paciganto.

Rigardante malantaŭen la dekdu monatojn ĵus pasintajn, oni konsolas sin pensante, ke finfine okazis nek mondaj militoj nek grandaj revolucioj, kaj ke sen sangoverŝado en Ĉinio oni "frakasis la kvarpersonan klikon", en Sovetunio Breznev forigis Podgorny-n, kaj en Hindio Indira Gandhi estis flankenmetita. Ne okazis rimarkindaj kunpuŝiĝoj inter Ĉinio kaj Sovetunio, kvankam la du kolosoj ne ĉesigis siajn disputojn; Tito iĝis 85-jara restarigante bonajn rilatojn kun Sovetunio; la nekonformeco en Oriento plifortiĝis; Carrilio ne sukcesis paroli en la Moskva Kongreso, sed anstataŭe parolis Berlinguer, kiu pledis por "itala komunismo". Kaj dum alterniĝis la homaj eventoj, jen tertremo en Rumanio, ŝtormego en Hindio, malbona vetero en Italujo. Al la perforto de la naturaj elementoj respondis tiu de la homoj: ĉie estis progresiva kresko de atencoj, raboj, ĉantaĝoj, kies kulmino estis la murdo de Schleyer en FRG (kun la koneksa mortigo de la teroristoj en Somalio kaj la "memmortigo" de la germanaj anarĥiistoj, kvazaŭ en greka tragedio.) Inter la plej elstaraj mortintoj de 1977, menciindas Makarios, Elvis Priesley, Roberto Rosselini, Charlie Chaplin, Maria Callas: sed flanke de tiuj, oni ne devas forgesi la viktimojn de terorismo sen idealoj kaj sen esperoj, la gejunulojn falintajn en la placoj pro subita eksplodo de politika malamo, kaj la senkulpulojn murditajn surstrate pro nura hazardo, dum kunpuŝiĝoj tute fremda al ili.

En ĉi tiu perspektivo, ne estas multe da loko por jarfinaj festoj. La sola bondeziro estas, ke dum 1977,naskiĝis, en la tuta mondo, ĉiurasaj infanoj, kiuj igu la estonton pli hela ol la nunon.

Laŭ elsendo de Radio Roma

## Semajna komentario de ORF-Radio Vieno

La semajna komentario de d-ro Werner Schmidt, legita de Johann Bronec kaj de d-ro Karl Beckmann, de la 7-a/8-a de januaro 1978 de ORF-Mallonga Ondo-Esperanto tekstas jene:

"Ĵus komencis en Vieno, inter la du grandpartioj, akra varb-batalo por la ĉi-jara komunuma elekto. Tute ne verŝajnas, ke la socialistoj perdos sian du-trionan plimulton en la jaro, en kiu la unuaj linioj de la subtera urbfervojo ekfunkcios, du novaj banhaloj atendas sian inaŭguron, kaj la faleginta Danuba Ponto - "Reichsbrücke" - estos rekonstruita post mallonga tempo.

Tial la unua gvidanto de la viena opozicia Popolpartio, Erhard Busek, kvankam kun sufiĉa optimismo, singarde evitas la taktikajn erarojn, kiuj kaŭzis, antaŭ kvar jaroj, la malvenkon de lia antaŭulo Hahn.

Semajna komentario...(Daŭrio)

Nur kun rezervo li menciis la riproĉan vorton "feltokratio", tio estas la feltosimila interplektado de partiaj aferoj, de partiaj interesoj, kun tiuj de la ŝtata burokrataro. Ĉar se vere io tia faktas en socialista Vieno, ĝi same faktas ankaŭ en popolpartie regataj federaciaj landoj, kiel ekzemple Vorarlberg kaj Malsupra Aŭstrio.

Aliflanke la socialista kanceliero Bruno Kreisky alprenas en sian registaron ankaŭ senpartiajn personecojn - ĉagrenante siajn proprajn sampartianojn. Kreisky eĉ intencas eknomi la plej amaran kritikanton de lia ekonomia politiko, Stephan Koren, prezidanto de la eldonbanko. Ĉu pro toleremco? Ĉu pro prefero de fakaj kvalitoj? Aŭ ĉu pro politika ruzo, kiu neskueble fidas sian propran forton?

Finfine: ĉiu partio alcelas por si mem kiel eble grandan "feltokration". Kaj Aŭstrio estas - signifoplene! - lando kun eksterordinare granda nombro da registritaj partianoj. Laŭdire iuj registrigis sin eĉ de pli ol nur unu partio!"

Esperanto en Radio

Radio Zagrebo, ĉiam sufiĉe bone aŭdebla dum noktmeza horo, ĉi-foje post la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio . disaŭdigis artikolon pri revido de Hispanio post 40 jaroj. Venontfoje oni aŭdos priparolojn de ricevitaj periodaĵoj. Tre rekomendinde aŭskulti!

Svisa Radio Kurtonda. En la venontaj semajnoj s-ro Gacond memorigos la 75-jaran ekziston de Svisa Esperanto Societo per citado de artikoloj kaj informoj el Svisa Espero. - D-ro Arthur Baur ĉi-foje denove parolis pri la romanĉa lingvo kaj pri la Romanĉa Ligo, la subtenanto la romanĉa lingvo, de kiu ne ekzistas komuna skriblingvo. Venontfoje s-ro Baur parolos pri la "Situacio de la lernejo en romanĉa regiono". Cetere d-ro Baur ĵus skribis al Pilo-Press i.a.: "Je tiu okazo mi dankas vin pro la regula alsendo de viaj gazetservoj kaj de la EER. Mi povas certigi vin ke mi ĉion tre atente studas, kiam ĝi alvenas al mi."

Radio Vatikana, kiu sur meza ondo ĉiam tre klare aŭdeblas kaj komprenelas, post la ĉiusemajna "Liturgia Penso" de P. Jacobitti multe parolis pri la paco. Oni akcelu la pacon en justeco kaj la paco dependas ankaŭ de vi. Radio Vatikana ne forgesis paroli pri la pozitivaj perspektivoj de la nova jaro, nome pri Sadat, pri la Charter-vizito kaj pri Beogrado.

Radio Varsovio. Kompare al la jaro 1976 Radio Varsovio havas korespondan deficiton de ĉ. 850 korespondaĵoj. En 1977 Radio Varsovio ricevis ĉ. 4 850 korespondaĵojn. Certe 4 850 estas bona nombro, sed kio estas la kaŭzo de la regreso? Ĉu la redakcio pravas dediĉi tro multe da leterkesta spaco ĉefe al la "korespondaj kolonoj", kiuj pasintjare tamen ne plenumis sian taskon, kio estas pro personaj kaŭzoj komprenebla - kaj tio validas ankaŭ por la skribinto el Nürnberg. Ĉu Radio Varsovio ne pli multe atentu la aŭskultantojn, kiuj ja regule aŭskultas, sed nur skribas tre malofte. Ĉiukaze restas la tasko por ni esperantistoj - kaj tio validas por ĉiuj stacioj - pli multe popularigi la Esperanto-elsendojn kaj instigi la Esperanto-parolantojn aŭskulti kaj pli ofte skribi al la stacioj. La Esperanto-Ekspreso aŭdigis ĉi-foje i.a. eldiron de prof. Neergard kaj jam antaŭe la eldirojn de pastro Kindler-Triksini. Ambaŭ eldiroj estis subjektivaj. La Esperanto-agado ja estas tiom multfaceta kaj validajn principojn fakte neniu povas starigi! - Ĉu Pollando venkos siajn ekonomiajn malfacilaĵojn? Se oni povas fidi al la vortoj de E. Gierek dum la landa konferenco de la Socialista Unuiĝinta Laborista Partio, Pollando sukcesos en la venontaj jaroj. Informoj kaj komentoj pri tiu konferenco estis la ĉefaj ĉi-semajnaj eldiroj. Krome oni ne forgesis i.a. la dankvortojn de Carter post lia vizito en Pollando, oni memorigis la datrevenon de la Ligo por la protektado de la naturo kaj oni konstatis - en Panoramo de Internaciaj Eventoj - , ke la plebiscito en Ĉilio havas neniun valoron. Ankoraŭ multe estis skribenda pri Varsovio - sed la spaco estas elĉerpita. Do - ĝis venontfoje!